EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 47> ● Estraraj taskoj ● Elstara Agado ● Deguĉi ● Lernado < aŭg. 26**

# Kongresaj rezultoj

La tuta nuna EKO-numero temas pri rezultoj el la Universala Kongreso (UK), ĉerpitaj el la centoj da kunvenoj tie okazintaj.

## Estraranaj taskoj en UEA dividitaj

La nova mandato de la Estraro de UEA (2022-2025) komenciĝis la 13-an de aŭgusto 2022 kaj daŭros ĝis la venonta elekto, antaŭvidata por la Universala Kongreso de Esperanto en 2025. Okaze de sia unua reta estrarkunsido, la 20-an de aŭgusto 2022, la Estraro dividis inter si la taskojn de la diversaj fakoj:

Duncan CHARTERS (Prezidanto) - Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado.

Fernando Jorge PEDROSA MAIA Jr. (Vicprezidanto) - Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko.

Amri WANDEL (Vicprezidanto) - Scienca kaj Faka Agado, Revuo *Esperanto,* Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko.

Aleks KADAR (Ĝenerala Sekretario) - Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo;

Aurora BUTE - Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo; (SMG: kaj fakte ankaŭ pri Landa Agado tra la mondo, kunlabore kun SMG, TEJO, ILEI kaj aliaj).

François LO JACOMO - Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Ĝemelaj Urboj.

Jérémie SABIYUMVA - Aktivula Maturigo, Afriko.

SO Jinsu - Eldonado, Azio kaj Oceanio.

Kontaktoj de la nova Estraro disponeblas ĉe https://uea.org/asocio/estraro aŭ en la kolofono de la revuo *Esperanto.*

# 12 diplomoj por Elstara Agado aljuĝitaj

En la Solena Fermo de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo estis anoncita la disdono de 12 diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado por la jaro 2022. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007: Diplomo pri Elstara Agado - Vikipedio (wikipedia.org )

**Elstara Agado**

1. **Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 107-a UK (Kanado)** pro la multjara laboro (2014-2022) por reokazigo de UK en Kanado, pro intensa kunlaboro por retaj eventoj dum la pandemio kaj pro sukcesa laboro por la unua UK en pandemia epoko;
2. **Pola Retradio (Pollando)** pro la regulaj elsendoj ekde 2011, sukcese daŭrigante en la reta epoko la tradicion de la E-radio;
3. **Adonis Saliba (Brazilo)** pro la multjardeka fortigo de la E-komunumo kaj pro la laboro pri instruado de Esperanto en Brazilo, inkluzive kadre de la projekto Nesto kaj la lastatempe furora programo 'Mia Amiko', per kiuj ĉiujare plurcentoj da homoj pere de la portugala lernas Esperanton kaj kadre de kiu kunlaboras sub lia kunordigo dekoj da instruistoj; *(SMG: Li ĵus anoncis novan kurson: EKO raportos)*
4. **Alexandrine Omba (DR Kongo) kaj Miora Rasoharinaivo (Madagaskaro)** pro la kunfondo de Esperantista Virina Asocio de Afriko (EVAA), pro la kunorganizado de la unua Afrika Kongreso de Virinoj (AKVo), pro la konstanta aktiva instigo al virinoj lerni Esperanton kaj pro longtempa instruagado por Esperanto en Afriko;
5. **Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio)** pro la revivigo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) en 2010 kaj ĝia tenado ĝis nun, kun riĉa agado, ĉefe en la pandemia epoko kaj dum la UK-oj;
6. **Povilas Jegorovas (Litovio)** pro la longtempa agado kiel motoro de la litova E-movado, aparte pro la ĵusa organizado de la Baltiaj E-Tagoj (BET);
7. **Robin Van der Vliet (Nederlando)** pro la reta agado en Esperantujo, inkluzive la tradukon en Esperanton de la furora poŝtelefona apo Telegram, pro la traduka kunlaboro por la versio en Esperanto de Wordpress, pro la kunlaboroj kadre de Komputeko, Vikidatumoj, Vikipedio kaj aliaj retaj agadoj, ĉefe kadre de Fonduso Instigo;
8. **Klaus Leith (Germanio)** *in memoriam*, pro la agado kiel gvidanto de la Komisiono pri Eŭropa Agado de UEA, interalie kadre de la informagado ĉirkaŭ la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, de Eŭropa Unio.

**Elstara Arta Agado**

1. **Zdravka Boytcheva (Luksemburgo/Bulgario)** pro la plurjara gvidado de la Internacia Koruso kaj la muzika agado en Esperanto;
2. **Joel Muhire (DR Kongo)** pro la kontribuado al la muzika E-kulturo;
3. **Wally Du Temple (Kanado)** pro la kontribuoj originalaj kaj tradukaj al la Eo-literaturo dum multaj jaroj;
4. **Ionel Oneț (Nederlando/Rumanio)** pro la kontribuoj tradukaj kaj eldonaj al la E-literaturo kaj pro la longtempa servado al la Libroservo de UEA.

# Premio Deguĉi 2022 al Osioka Taeko

UEA starigis la Premion Onisaburo Deguĉi en la Jubilea Jaro 1987. Ĝi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de religia gvidanto de Japanio, Onisaburo Deguchi (Deguĉi). Spegule al la ideoj de Zamenhof kaj Deguĉi, la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. Ĝis nun 28 individuoj kaj 7 grupoj estas premiitaj, kaj nun estas anoncata la 29-a persono. La premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 1000 eŭroj kaj estiĝis de fonduso proponita kaj starigita de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA), faka organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun UEA.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2022 estas aljuĝita al:**Osioka Taeko**. Ŝi naskiĝis la 21-an de novembro 1948 en Hiroŝimo en Japanio kaj aktivas en la sama urbo. Ŝi estas esperantistino kaj aktivulino por paco, virinoj, homaj rajtoj kaj kontraŭ nukleaj armiloj.



De jardekoj ŝi aktivas por Esperanto kaj paco. Ŝi subtenas la agadon de Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj plurfoje vojaĝis tra la mondo kiel parto de japana pacdelegitaro por ekspozicii pri Hiroŝimo kun la celo ne forgesigi la atombombadon kaj pledi por malarmo de atombomboj. Kun sia edzo (Osioka Moritaka, ankaŭ aktivulo de JEI) ŝi faris el sia hejmo la Hiroŝiman Esperanto-Centron. Pli ol 100 samideanoj de 30 landoj jam gastis en ilia hejmo, foje eĉ 11 gastoj samtempe.

Fakulo pri la atombombado, en 2018 ŝi lanĉis libron (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=78) pri la temo. En 2020 ŝi speciale prelegis kadre de la Monda Festivalo de Esperanto, okaze de la virtuala Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco, kiu markis la 75-jariĝon de la atombombado en Hiroŝimo kaj Nagasako. La prelego temis pri ŝia esplorado pri atesto de koredevena postvivinto de la atombombado. En 2021 ŝi estis la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 108-a Japana Kongreso en Hiroŝimo, kiu devis okazi virtuale pro la pandemio. Ŝi kaj la LKK elektis kiel kongresan temon “La mondon ligas animoj de Hiroŝimo”.

Profesie ŝi laboris kiel instruistino en elementa lernejo. Nuntempe ŝi estas ĉiĉeronino en la hiroŝima Paca Parko, kie ŝi gvidas la turistojn kaj vizitantojn kaj klarigas pri la eventoj de la sesa de aŭgusto 1945, kiam la unua atombombo falis sur la urbon Hiroŝimo. Ŝi ludas gravan rolon en la pacmovado en Hiroŝimo per kolekto de subskriboj por subteni malarmadon de nukleaj armiloj: de vizitantoj ŝi kolektas la subskribojn kaj sukcesis arigi 111 000 subskribojn ĝis nun.

Estas speciala la aljuĝo de la Premio Deguĉi al S-ino Osioka Taeko en la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo, frata urbo de Hiroŝimo. La 5-an de aŭgusto 2022, vespere de vendredo antaŭ la komenciĝo de la UK, sonoris la “Paca Sonorilo” en la Japana Ĝardeno de la Montreala Botanika Ĝardeno, kondolence al la viktimoj de la atombomba tragedio. Sekvis minuto da silento, koincidante kun la momento, kiam la atombombo estis ĵetita sur Hiroŝimon matene de la 6-a de aŭgusto (japana horo) antaŭ 77 jaroj (en 1945). Ĉi tiu emblema sonorilo estis donacita de Hiroŝimo al Montrealo antaŭ 24 jaroj, okaze de ilia ĝemeliĝo.

La foto liverita de JEI, la japana Landa Asocio de UEA.

# Sukcesa "Tago de Lernado"

Jam tradicie, la marda duontago estas rezervita por "Tago de Lernado" en prizorgo de ILEI. Post du virtualaj "Tagoj de Lernado", ĉi-jare denove ni havis la eblon ĝui vivan kvin-horan programon kun temoj proksimaj al edukado kaj instruado.

La ĉefa temo de la "Tago de Lernado" estis "Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj" kaj subtemo "Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado".

Bedaŭrinde, la pandemio kaj ĝiaj postsekvoj grave influis la preparon de la evento. Kelkaj prelegantoj forfalis, pro la fakto, ke ili ne povintis vojaĝi. Surloke inter ok prelegantoj surpodiiĝis nur ses: Zdravka Metz (Kanado), Duncan Charters (Usono), Katalin Kovats (Nederlando/Hungario), Orlando Raola (Usono) kaj Kristin Tytgat (Belgio). La prelego de Maritza Gutiérrez (Kubo) estis prezentita en la skriba formo.Ne alvenis du personoj pro manko de la vizo kaj infektiĝo de Kovid.

Tradicie, oni enkondukas la programon per la prezento de la eduka sistemo de la gastiganta lando. Tamen, pro la amplekseco, oni donis atenton al Kebekio. Sekvis interesaj prelegoj kiuj de diversaj flankoj proksimigis la ĉeftemon. Laŭ la impresoj de la partoprenintoj la programo estis altkvalita kaj interesa, kion montris la nombro de la kongresanoj en la salono. La tekstoj de la prelegoj legeblos en IPR.

La kompletan programon dum kelkaj monatoj pretigis Marija Belošević (Kroatio), kaj surloke gvidis Duncan Charters (Usono) kaj Orlando Raola (Usono).

Marija Belosevic

Alvenadas pliaj informoj el la UK, do ni revenos al la temo en la sekva komuniko

========= vortoj: 1445 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.